

& Ĉielarka fabelo:

< Rekante 35 el 61 batoj por strofo, entute 1708 paŝoj dum 18 minutoj. Verkis Adam Asnyk. El pola tradukis Antoni Grabowski (Parnaso de Popoloj, 1913). Baladigis Martin Strid (2016) per sveda ŝotiso el Särna.)

(#Melodio:

<:61> (

/mi relTi do TilLa SiMi Mi Mi; MilFi SilLa Ti Ti LalSi Laldo mi mi; mi relTi do TilLa SiMi Mi Mi; MiFi SiLa Tido TiSi;

(#Rekantaje: La La La a; do dore do TilLa Ti mi mi relTi; do dolre do TilLa Tido TiSi Mi; do dore do TilLa Ti mi mi relTi; do Lado Ti MilSi La La La a)

)×28)+

(&Strofoj:

'1 /De lu2lilo2 min postiris ; Ĉi2e2larka mi2rfa2belo, ; Kaj ĝi2 flustri2s melodie ; Sorĉ-parolojn al orelo.

(×:; **en la danc' . ; Tenu la paŝo2jn en la ĉeno2 ; ni ve2turo2s per la ĉielark' . ; Brilas koloro2j de ĉagreno2. ; Ligas ni kosmo2n en la danc' .)**

'2 Naskis ĝin en fruvespero ; Vartistinoj-babilado. ; Kaj kun mi ĝi poste dormis ; Kaj min kisis dum sonĝado.

'3 Ĉiam kune vekiĝante, ; Ni elkreskis el luliloj, ; Kaj ĝi min en strangan mondon ; Ien portis sur flugiloj —

'4 Super la purpuraj maroj, ; Super la arĝent'-riveroj, ; Sur la ĉielarka ponto ; En transmondon de misteroj.

'5 Malfermiĝis laŭ ĵurvorto ; Rok-pordeg' el diamantoj, ; Kaj mi pasis en sorĉlandon ; De fantomoj kaj gigantoj.

'6 Kaj post mi pordegon fermis ; Aŭ feino aŭ diino, ; Do mi iris en la landon ; Vagi ĝis la vivofino.

'7 En la stranga lando, kie ; Ĉio vivas kaj parolas, ; Kie ĉiu ŝtono spiras ; Kaj fariĝi homo volas —

'8 Iris mi tra helbrilanta ; Arbareto orfolia, ; Kie floras en la ombro ; La filika flor' magia.

'9 Iris mi tra l' arbareto, ; Kie arboj kantojn bruas, ; Kie de l' junec' eterna ; La kristala fonto fluas.

'10 Kaj salutis min envoje ; La okuloj de florrondoj ; Per rigardo forturnita ; Al senlima spac' de mondoj.

'11 Kaj salutis homavoĉe ; Min birdaro kolorplena ; Kaj montradis pluan vojon ; Ĉe l' abismo malserena.

'12 Kaj obeis mi aŭguron, ; Trinkis mi el viva fonto, ; Tra sovaĝa la dezerto ; Iris mi sen tim' al monto.

'13 Vane siblis la rampaĵoj ; Kaj fantomoj min teruris; Mirhelaĵon rigardante, ; Mi antaŭen ĉiam kuris.

'14 Post traŭro de l' dezerto ; Kaj de l' akvo ŝaŭm-ondanta, ; Mi ekstaris apud monto ; Vertikale leviĝanta.

'15 Supre brilis la kristala ; Kastel' de gigant' kruela, ; Kies sorĉan povon spertas ; Virgulino la plej bela.

'16 Antaŭ la kastelo drakoj ... ; Ruĝajn faŭkojn larĝ-distiras ; Kaj per oraj fajroflamoj ; Ĝis la nuboj supren spiras.

'17 Hirtigante bronzajn skvamojn, ; Ili gardas sorĉ-trezoron, ; La plej belan virgulinon, ; De kristal'-kastelo gloron.

'18 Tamen malgraŭ vigla gardo ; Mi ekvidis ŝin sur monto, ; Ŝin, pro kiu mi alvenis ; Doni vivon kun volonto.

'19 Havis ŝi sur frunto stelon, ; Sub piedoj rikoltilon ; De lun', kaj anĝel'-vizaĝon, ; En okuloj lazurbrilon.

'20 Tuj rigardo ŝia vekis ; Mian amon en la koro, ; Kaj al ŝi nun supren-celi ; Mi komencis kun fervoro.

'21 Do mi tuj, ĉe l' glata muro, ; Per plektaĵ' de konvolvuloj ; Super senfundaĵ' ekpendis, ; Ŝin serĉante per okuloj.

'22 Kaj mi grimpis ĉiam supren, ; Jam
proksime ŝin admiris, ; Kaj al rava reĝidino ;
Ambaŭ manojn mi eltiris.

'23 Tuj mi kaptos ŝin en brakojn ... ; Ve!
hederoj sin disŝiras — ; Kaj mi falis en
abision, ; Kaj pereas kaj sopiras!

'24 Kvankam kora sang' forfluas, ; El abismo,
la malhela, ; Vokas mi: "Ho kavaliroj! ; Kuru,
kuru post la bela!"

'25 Grimpu supren! ĉiam supren! ; Vin sur
nigrajn rokojn svingu, ; Ke alvenu feliĉulo ;
Kaj posede ŝin atingu!

'26 Se li ne atingos — falos, ; Ne vantiĝos vivo
lia, ; Ĉar plej bona vivoparto ; Estas
postkurado tia.

'27 Vidi eĉ de malproksima ; Sorĉ-kastelon el
kristalo, ; Indas iri sango-page ; Al la land' de
l' idealo.

'28 Se denove komenciĝi ; Povus mia
vivokuro, ; Duafoje mi postkurus ; Belulinon
en lazuro.)